



**FLANDRA  
ESPERANTISTO**  
MONATA REVUO  
ORGANO DE LA FLANDRA  
ESPERANTO  
MOVADO

**ENHAVO:**

Je l'nova jaro. — Je nia novjara numero. — Subteno por nia revuo. — La transportisto. — Heroeco. — 1830-1930. Funebra Datrevena Festo por la Flandroj. — Severa Kritiko pri la K. R. — Simile al la mar'. — La Alsac-Lorena Alfabeto. — Esperanto door Zelf-onderricht. 6<sup>de</sup> Les. — Bibliografio. — 1a. Flandra Kongreso de Esperanto. — Inter ni. — Pri „Flandra Esperantisto”.

**JARA ABONPREZO** : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

LA KATOLIKE INTERESEHAVA KAJ

RIĈE ILUSTRITA REVUO

# “ESPERO-KATOLIKA”

Eliras dusemajne sub arta kovrilo dukolora

---

Almenaŭ 16 paĝa. — Formato 27X19 cm.

---

*Por Belgujo abonebla ĉe S-ro CESAR VANBIERVLiet,*

*Wolvenstraat, 3, Kortrijk.*

*Poŝtĉeko 2289.27.*

JARABONO = 35 BELG, FRANK,

---

## ĜIAJ RUBRIKOJ :

Ĉefartikoloj. — La katolika kaj ĝenerala Esperanto movadoj. —  
Vivo Katolika. — Tra la gazetaro. — Literaturo. — Novaj libroj. —  
Muzikaj paĝoj. — Humoraĵoj. — Virinaj paĝoj, k. t. p.

---

Por instigi niajn Belgajn samideanojn aboni tiun gazeton nepre  
necesa por praktike enkonduki Esperanton en la Katolikajn mediojn,  
ĉiu abonanto de Flandra Esperantisto, kiu abonos ĝin antaŭ la  
31-1-1930, senpage ricevos kiel premio la kortuŝan romanon „KLARI”  
(valoro 10 bf.)

Aldonu la adresbandon al la mendo-Kompreneble tiu premio estas  
donata nur al novaj abonantoj.

# FLANDRA ESPERANTISTO

Organo de la Flandra Esperanto-Movado

APERAS ĈIUMONATE.

Redaktoro kaj Administranto :

JAN VAN SCHOOR

Julius De Geysterstraat, 149/1, Antwerpen.



Jara abonprezo : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

Poŝtĉeko : 1735.09

*Al niaj legantoj :*

*FELIĈAN NOVJARON.*

## JE L'NOVA JARO. (\*)

La jar' malnova agonias  
simila al maljuna vir' ;  
el lia brust' baldaŭ forflugos  
malforta lia lasta spir'.  
Ni ĝoje enterigos lin  
kun nuda nun la kalendaro ; —  
ĉe l'pordo ŝtelatendas jam  
la nova jaro !

Ve ! ofte dum l'antaŭa jaro  
abunde sangis nia kor' ;  
ni ĉiam vane luktis kontraŭ  
mizero, malfeliĉ', dolor'...  
Sed ĉion ni forgesu nun  
ĉe plena glaso da nektaro :  
ekkantu ni honore de  
la nova jaro !

Ankoraŭ vivas la mensogo  
kaj estas homo ofte sklav',  
ankoraŭ grumbblas la militoj :  
ne ekaperas jam la Sav'.  
Sed kvazaŭ dia la Mesi'  
alportas jen al la homaro  
esperon novan je l'estont'  
la nova jaro !

Samideanoj ĉiulandoj,  
kunligas nin la sama cel' :  
la nova jaro nin retrovos  
sub la standardo kun la stel'.  
Antaŭen ĉiam iru ni,  
nin ne haltigu tempa baro :  
promesas novajn venkojn ja  
la nova jaro !

JAN VAN SCHOOR.

(\*) Premiita en la XI aj. Internaciaj Floraj Ludoj.

## Je nia novjara numero.

Jen nia novjara numero!

Estas la sepa! „Flandra Esperantisto” nur aperos 6-foje, oni kaŝe skribis, kaj jen la 7a. numero! Kaj la aliaj sekvas tiel regule kiel la antaŭaj!

Al niaj kunlaborantoj, dankon pro la helpo!

Niaflanke, ni ne promesos, ni efektivigos. Ni daŭrigos nian vojon! Kaj kiam nia 1a. jaro estos finita, niaj legantoj mem diros sian opinion pri la revuo, diros ĉu ni seniluziigis ilin, diros ĉu ni faris bonan laboron!

Ni deziras konstrui, konstrui... Sed ni estas certaj, ke dum tiu laboro ni de tempo al tempo devos forigi kelkajn barojn kaj daŭrigante nian vojon, ni devos premi la piedfingrojn de la Belga Ligo-estraranoj, kiuj, ĉar ili ne volas aŭskulti, laŭ flandra proverbo, devos senti.

Ĉar estas necese, ke ni malfermu la okulojn al niaj flandraj samideanoj: la Belga Ligo estas *pseŭdo-neŭtrala*, estas *liberalisma* organizaĵo.

Krom tio, ni povas pruvigi, ke la Belga Ligo ne atentis la dezirojn de siaj membroj: ke unu-du personoj estras la Ligon laŭ ilia propra, persona konvinko.

La afero estas klara: la Flandroj, kiuj ne ŝatas diktatorecon, kiuj ne ŝatas vangofrapojn, kiuj ŝatas aranĝi mem siajn aferojn, kunlaboros por fondo de propra Ligo. *Tiu Ligo estos fondata!*

La 1a. *Flandra Kongreso de Esperanto* okazos dum Pentekosto en Antverpeno kaj ĉio antaŭvidigas, ke la kongreso iĝos vera sukceso. La organizantaj grupoj; la neŭtrala „La Rekta Vojo”, la socialista „Nia Ideo” kaj la „Flandrema Grupo” zorgos pri tio.

Ni fieras, ĉar estas grandparte la verko de nia revuo!

Antaŭen, flandraj samideanoj! Por la bono de Flandrujo! Por la bono de la mondpaco! kaj *last not least* por la bono de Esperanto!

FLANDRA ESPERANTISTO.

---

*Neŭtralismo ne povas esti doktrina sistemo. Ja! Se ekzistas diferenco inter vero kaj malvero, kiel ankaŭ inter bono kaj malbono, neŭtrale kondukti, t. e. ne decidi por unu aŭ alia estas jam malkuraĝo: deklari ke ili samvaloras aŭ ke ili samrajtas estas nekomprenebla spiritmalvirteco.*

### SUBTENO POR NIA REVUO.

Ciumonate: Théry, 10.—; Jan, 10.—; Mart, 10.—; Zus, 10.—; Fik, 10.—; Pittoors, 10.—; Piet, 20.—; Jef, 10.—; Mikke, 10.—; S-ta Nikolas-donoco de H. V., 10.—; Eulaers, 5.—; Ledez, 4.—; Van Gansen, 10.—. Entute: fr. 129.—.

# La transportisto

de D. Pinski.

Mojŝe Ahron, la portisto, vagas pala sur la trotuaro, ĵetas neĝojajn kaj demandajn rigardojn al ĉiu preteriranto. Li alpaŝas al magazenoj, haltas, enrigardas kaj demandas per sia malĝoja vidĵeto pri laboro kaj ne ricevinte respondon li foriras.

— Kion bonan, Mojŝe Ahron? demandas lin magazenisto, ronda judo en longa kapoto kun velura ĉapo kaj faras ĉe tio malkontentan mienon.

— Ĉu ne estas io por porti?

— Mian ventrodoloron, ĝemas la magazenisto.

Mojŝe Ahron foriras.

— Kion vi bezonas, „bonvenigas” lin kun kolero magazenistino, kiu, kiam Mojŝe Ahron envenis estis okupata per laŭta interparolado kun sia edzo.

— Jen! nenion, li balbutas, mi ion transportus.

— Se oni cin bezonos oni cin trovos, responde kriis la virino kaj turnis sin ree al la edzo.

Mojŝe Ahron reiras al la fino de la strato; tie staras pli multe da portistoj. Lia malfeliĉa vizaĝo tuj estas ekkonebla.

— Kio okazis kun vi, Mojŝe Ahron? demandas unu.

— Lia edzino verŝajne la dekan fojon nun naskas, alia respondis por li.

— La tri abortnaskojn vi verŝajne ne enkalkulas, ridas la tria. Mojŝe Ahron rigardas la preterirantojn kaj ŝajnigas neaŭdon.

— Laŭvere, kio okazis kun vi, Mojŝe Ahron, redemandas la unua.

— Kio devas okazi? Mojŝe Ahron diras kore kaj turnas la vizaĝon al la kamaradoj-samprofesianoj, kio devas okazi? Kiam depost kvar tagoj oni nur manĝas sekan panon, oni ne perlaboras.

Ĉiuj eksilentis. Neniu jam ne sukcesas eldiri spritaĵojn kaj ili enrigardas en la straton kun malĝojaj pensoj; aŭdiĝas pezaj ĝemoj.

— Depost du tagoj mi ne perlaboris eĉ unu groŝon, ĝemas unu.

Neniu respondas, ili disiĝas. Mojŝe Ahron ree ekvagas inter la magazenoj.

— Mojŝe Ahron, Mojŝe Ahron! vokas lin iu portisto, iru: estas ia kesto por porti; ĉu vi havas forton?

— Troviĝos.

Sespuda (1) kestego; li apenaŭ sukcesas ĝin forpuŝi de la loko. Li haltas dum iom da tempo kaj meditas ĉu li portos ĝin aŭ ne; en la magazeno oni opinias, ke li pripensas kiamaniere plej facile levi la ŝarĝon.

(1) proksimume 100 kilogramoj.

— Starigu ĝin sur la grandan sakon, la servisto konsilas kaj montras al li grandan plenan sakon.

— Venu kaj helpu al mi ĝin surstarigi, li proponas al la servisto.

— Kaj mem? diras la servisto kaj tamen iras al li por helpi.

Ĉe la unuaj kelkaj paŝoj kun la keŝtego Mojŝe Ahron apenaŭ ne falis.

— Ĉu ci estas ebria aŭ kio? oni krias el la magazeno.

— Jes! ebria! li responde murmuretas.

La portisto, kiu proponis al li la aferon transporti tiun ĉi keŝtegon renkontas lin demandante:

— Ĉu peza?

— Kaj se peza, kio estas?

Li apenaŭ povas paŝeti; sed li penas streĉi la fortojn, li ja ricevos por tio dudek kopekojn. Antaŭ liaj okuloj svensignoj montriĝis, la sango alfluas la kapon, tamen li paŝas. Li jam estas proksime de la domo, sed la kapturigo plifortiĝas; ŝajnas al li, ke iu lin facile ekpuŝis flanken kaj li falas ien profunden, profunden...

Ĉar tio okazis en la tempo kiam regis la epidemia holero-malsano, oni surstrate tiele interparolis:

— Kia amasiĝo?

— Portisto falis.

— Ĉu li mortis?

— Jes.

— De ĥolero?

— Kiu scias?

— Ĉar la malriĉulaĉoj manĝegas demonoj scias kion.

*El la juda lingvo tradukis,*

S. GUTERMAN.

## HEROECO.

Dum la revolucitagoj en 1830 per la vento transblovitaj Parizanoj estis elpendigintaj francan flagon ĉe la brusela urbodomo. Simpla burĝo, sen ies helpo, estis anstataŭiginta ĝin per la brabant trikoloro. 25 Jarojn poste oni festis tiun okazintaĵon dum festeno de Eks-Batalantoj de '30 kaj nia heroo sidis inter reĝo kaj urbestro.

Kiam Leopold estis demandinta al la brava viro kiel li estis riskinta la kuraĝan agon, aŭdiĝis la neatendita respondo:

— „Kiam oni estas ebria, ĉu ne, reĝa Moŝto.... kiam oni estas ebria!“

*Tradukis el „Vlaamsche Volkskalender 1930,“*

JOHN THÉRY.

# 1830 - 1930.

## Funebra Datrevena Festo por la Flandroj.

### A. — La deveno de la sistemo.

1830-31. *La gvidantoj de la revolucio de 1830 volis la anekson de Belgujo al Francujo.*

DE LANNOY „Origines diplomatiques de l'Indépendance belge (1903) : La revolucio komencis per ribelo, precipe organizita de francaj instigantoj”.

DELWARDE deklaris sin en kunveno de la Nacia Kongreso de la 5a. de Januaro 1831 por anekso, ĉar Francujo estis estinta la motivo de la revolucio.

BARTELS. Documents historiques sur la Révolution (1836) : „La deirpunkto de la revolucio estis Francujo”.

FREDÉRIC DE MÉRODE. En kunveno de la Nacia Kongreso : „Sen Francujo mi ne de ĉi tiu tribuno parolus al vi”.

CHAZAL en letero al Firmin Rogier (28an. de Januaro 1831) : Mia plej arda deziro en la nunaj cirkonstancoj estas la kuniĝo kun Francujo”.

CH. DE BROUCKÈRE, Nacia Kongreso (Kunveno de la 31a. de Marto 1831) : „Ne estas savo por Belgujo ekster kuniĝo kun Francujo”.

DAVIGNON (Verviers). Kunveno de la 11a. de Januaro 1831 : „Ne estas nur kelkaj enloĝantoj, kiuj petas la aliĝon al Francujo, estas tuta loĝantaro,

NOTHOMB (Arlon). Kunveno de la 31a. de Januaro 1831 : „Ni ne povas nei tion, sinjoroj : Francujo serĉas Belgujon, kaj Belgujo serĉas Francujon”.

1830-31. *Kelkaj ĉefuloj de la belga revolucio laŭ ilia vera aspekto :*  
Grafo ANTOINE DE CELLES distingiĝis per la malbonmoreco de sia konduto kaj per diversspecaj ekstravagancoj.

SYLVAIN VAN DE WEYER : „... Ni demandas kiu estis la fonto de la fortuno tiel rapide kolektita de tiu juna diplomato”. (Biographie des Hommes de la Révolution).

Generalo A. J. MELLINET, Franco, kiu estis forkurinta el sia lando pro kontraŭleĝaj krimoj ; vivis kelkfoje pro malbona konduto en la plej granda mizero kaj estis multfoje subtenata per moŝta helpo.

Burgrafo DE CULHAT, Franco, forkurinta el sia lando por sin for-savi de la Krimea Kortumo. Estis kondamnita de la belga juĝistaro pro ŝtelo.

Generalo CH. NIELLON, Franco, kiel krimulo forkurinta el Francujo. Ekloĝis unue en Bruselo... kiel aktoro.

Don Juan VAN HALEN, Hispano. Imputita je forkuro, perfido kaj subaĉeteblo. Li iĝis la ĉefkomandanto de la belga revolucia militistaro.

Burgrafo LE DOUCHET-DE PONTÉCOULANT, Franco, ĉefo de la „Légion belgo-parisienne, rabaventuristaro sen disciplino, kiu venis de el Parizo por... helpi dum la unuaj bataletoj.

1831. Preskaŭ ĉiuj altrangaj oficiroj de la unua belga armeo estas naskitaj Francoj :

Generalo NIELLON (vidu supre). Ĉefkomandanto de Orienta kaj Okcidenta Flandrujo.

Generalo DESPREZ, franca leŭtenant-generalo, iĝas la ĉefo de la belga generala stabo.

EVAIN, franca leŭtenant-generalo, iĝas generalo ĉe la artilerio ; poste Ministro de Milito.

Generalo NEMPDE, franca marŝalo. Ĉefo de la pioniraro.

PICQUET, franca leŭtenant-generalo, iĝas generalo ĉe la kavalerio.

GRUNDLER kaj BILLIARD, francaj leŭtenant-generaloj, iĝas generaloj ĉe la infanterio.

HOTON, franco, iĝas ĉefo de la reĝa generalejo.

Barono PRISSE, franca eks-oficiro, iĝas vicĉefo ĉe la stabo.

Princo ACHILLE MURAT, franco, iĝas ĉefo de la Fremdullegio.

Ili ĉiuj gardis sian francan uniformon kaj sian francan kokardon.

*La difino de la sistemo :*

1831. El letero de Charles Rogier, franco el Arras, belga ĉefministro de eksterlandaj aferoj, al la angla ĉefministro, Lord Palmerston : „La klopodoj de nia registaro devas celi la malaperigon de la Flandra lingvo por pretigi la kunigon de Belgujo kun nia granda patrujo, Francujo”

1834. El letero de la sama Charles Rogier al sia kolego de juĝaj aferoj, ministro Raikem : „La ĉefaj principoj de bona administracio estas bazitaj sur la nura uzado de unu lingvo kaj estas kompreneble ke la nura lingvo de la Belgoj devas esti la Franca. Por atingi tiun rezulton estas necese, ke ĉiuj oficoj estu aljuĝataj al Valonoj kaj al Luksemburganoj ; tiamaniere, la Flandroj, tempe forigataj de la favoroj de tiuj funkcioj, estos devigataj, lerni la francan lingvon kaj tiamaniere oni detruos iom post iom la Ĝermanan elementon en Belgujo”.

1915. El sekreta broŝuro „Alvoko al la Valonoj” : „Ne estas belga nacio, sed per la kaprico de la diplomatoj el 1830 estas belga ŝtato, abomeninda, artefarita kreitaĵo. Valonoj! Rogier, Gendebien, Surlet



estis la elokventaj interpretantoj de la Valonoj. Ili uzis ĉiujn siajn fortojn por fari de Belgujo francan provincon, sub franca regado, kaj ili volis maturigi en ĉi tiu lando la francan kulturon je la gloro de Francujo kaj malgraŭ la flandra kontraŭstaro”.

*Kelkaj opinioj pri la revolucio :*

Profesoro FRANÇOIS LAURENT (Gent) : „La granda trompo de 1830”.

Profesoro EMILE DE LAVELEYE : „Nepardonebla eraro, krimo kontraŭ la trankvileco de Eŭropo”.

Profesoro GOBLET D'ALVIELA : „La granda malfeliĉaĵo”.

Ĝen. Prokuroro DE BANAY. („Histoire de la Révolution belge” 1873) : „La belga revolucio komencis per bataleto, organizita de la parizaj kluboj, kun franca celo”.

Urbestro KAREL BULS (18an. de Aŭgusto 1833), en parolado al nederlandaj urbsoldataraj oficiroj : „Eble estus estinta pli bone, se nia sorto, kiu tiel longe estis sama, neniam estus estinta disigita”.

Profesoro PAUL FREDERICQ (Geschiedenis der Vlaamsche Beweging) : „La malfeliĉiga jaro 1830”.

D-ro VICTOR FRIS, Gent. („De Belgische Omwenteling”) : „La malatentado aŭ neado de la materiaj interesoj de la Flandroj estas ankoraŭ ombriegata per la subpremado de iliaj spiritaj rajtoj”.

La sama klerulo diris dum la Flandra Landtago de la 27a. de Aŭgusto 1905 : „En siaj sekvoj la revolucio estis kontraŭ la flandra popolo krimo, katastrofo! La flandra popolo estis tuj subpremata”.

Patro JAN VAN RYSWYCK kaj kunredaktintoj en sia manifesto de 1855 : „La 25a. jaro de la ekzistado de Belgujo estas samtempe la 25a. jaro de la subpremado de Flandrujo. Depost 25 jaroj la Flandroj estas fremduloj en propra lando”.

JULIUS VUYLSTEKE, 1887 : „La Flandroj en 1830 estis inter la venkitoj”.

Konsilanto THIERS en la Prov. Konsilantaro de Okcidenta Flandrujo (1929) : „En Oktobro 1830 la pariza kuracisto Grégoire, kondukante francajn rabistojn, ŝtelis el la komunuma kaso de Sas-van-Gent 5000 frankojn, marŝas al Oostburg por prirabi tiun lokon, publikigas „proklamon”... Kelkaj kanonpafoj dispelas la bandaĉon. Flandrujo ne simpatiis kun la revolucio : la loĝantaro restis pasiva kaj la revolucio iĝis nur fakto sekve de la okupado de „francaj” soldatoj, ĉi tien vokitaj de la „Provizora Registaro” el Bruselo. La tiama flandra popolo ne partoprenis la revolucion”.

(Daŭrigota)

K. A.

# Severa Kritiko pri la K. R.

— En *Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio* samideano A. Siitam finas siajn Impresojn pri la Dudekunua per tiuj saĝaj vortoj:

„Bedaŭrinde mi ne havis eblecon partopreni fakkunvenojn, por kona-tiĝi kun ilia spirito, sed mi vidis nian parlamenton, la Konstantan Re-prezentantaron. Ĝi estis la plej granda seniluziigo en la kongreso kaj malkaŝigo de la sekreto de miaj jaroj neesperantistaj: kial oni ne instruas la lingvon internacian en la lernejoj.

En la kunveno, partoprenita de proksimume 20-30 personoj, mi trovis ne seriozan oficialecon, sed nur grandan hejmecon kaj amikecon. De la tuta kunveno mi ricevis la ĝeneralan impreson, ke la nunaj centruloj de nia movado estas bonaj amikoj, kiuj ludas gvidadon de nia movado, sed la efektiva movado paŝas hazarde, necentrigite per siaj naturaj leĝoj.

La nunaj centruloj ne estas kapablaj solvi la problemon de internacia lingvo, la nuna formo de organizo ne estas kontentiga! Necesas profunda reorganizado kaj trovo de personoj batakapablaj. Se tion nun ne okazigos la centro, tio fariĝos baldaŭ de si mem — fariĝos revolucio en la Esperanto-movado. Alvenas jam nova sango: amasa esperantistigo en Svedlando, multaj novaj kursanoj de A. Ĉe ĉe ni, en Latvujo, Nederlando, k.t.p. En Esperantujo pasas jam tempo de „amatoreco!”

Niaj flandraj samideanoj ne miros pri tiu severa kritiko, se ni diras, ke la *prezidanto* de la *Konstanta Re prezentantaro* estas... *S-ro Henri Petiau*. (Kial vi ridas?) Sed pri tio ili ankaŭ ne miros, se ni diras, ke *S-ro Frans Schoofs* estas la *sekretario-kasisto*. (Kial sulketiĝas via frunto?)

Sed kiu solvos tiun enigmon: ĉiu nacia societo esperantista elektas po unu reprezentanto. Kial do Belga Ligo havas du?

## SIMILE AL LA MAR' (\*)

Simile al la mar'

Animo mia revas,

Se la krepusko de l'vesper'

Forviŝas ĉion for de l'ter'

Kaj lun' sin alte levas...

Simile al la mar'

Animo mia luktas

Se, de l'ventego vemuĝad'

Al mi parolas pri plendad'

Kaj ondoj forte bruas...

Simile al la mar'

Animo mia estas,

Movante kaj ŝanĝante sin.

Animo, mi ne konas vin ;

Mistera, ho, vi restas.

C. J. ROSKES-DIRKSEN.

(\*) Premiita en la XIII aj. Internaciaj Floraj Ludoj.

N I A  
P A T R I N O  
:  
F L A N D R U J O



F L A N D R A J  
E S P E R A N T I S T O J  
N E  
P E R F I D U  
S I N

Guido.

## LA ALSAC-LORENA ALFABETO.

„L'Alphabet Alsacien-Lorrain” estas la titolo de ilustrita libro, kiu estas disdonata kiel rekompenco al la bonaj lernantoj en la lernejoj de Strasburgo. Sur la koverto oni vidas francan soldaton (poilu), kiu, ĉirkaŭata de alsacaj kaj lorena' infanoj, kaj portanta en traŝultra rimeno pafilon kun rozo ĉe la ekstremaĵo de la tubo, elirigas el sia dorssako, kun la eleganteco de „music-hall”-ĵonglisto, tutan aregon da literoj. Tiuj literoj, - kiu ne ĝin tuj divenus - formas la vortojn „Vivu Francujo” (Vive la France). La libro aperis ĉe Hachette kaj estas ilustrita de la Nezière, artisto kiu ne trovis pli bonan modelon ol Hansi. Ni parolas pri tio ne pro la arto-valoru, sed nur pro ĝia malalta ŝovinisma tendenco.

La litero A estas reprezentata per „Alsacanoj” (Alsaciens): du Alsacaj knaboj, kiuj brako en brako promenas, gaje svingante trikolorajn flage-tojn. Dua bildo reprezentas la Germanaĉojn (Boches) por anonci la literon B: germana knabo vestita per krudrapa vesto kaj infanteriaj botoj, kun ŝama plumo sur sia verda ĉapelo. Sur lia terpomforma nazo, teruraj okulvitroj, malrekte sidantaj. Kun falsa rigardo, li turnas la kapon al malgranda Alsacano, kiu, simila al venĝanta anĝelo, tenanta triko-loran flagon en ĉiu mano, forpelas lin el la tera paradizo. Flanke de la knabo paŝetas lia akompanantino, vestata laŭ la sama gusto. Ŝi portas pend-horloĝon kiu kompreneble, laŭ la legendo, estis rabata en franca kastelo.

Ni turnu la paĝojn. Ĉie malgrandaj Alsacanoj kun la duoblo da tri-koloraj flagoj. Tie ĉi ili ĝoje ekkrias je la ekvido de franca generalo. Tie ili bruligas prusan limfoston aŭ dancas ĉirkaŭ malgranda pino al kiu oni pendigis, kiel speciala ornamo, malgrandan „poilu”. Ĉiuokaze, tiuj infanoj falas en patriotan ekstazon. Eĉ antaŭ kazerno.

La litero U estas ankoraŭ pli signifa. Ĝi estas reprezentata per „Ula-noj” (Uhlans): kaptitaj ulanoj kondukataj de franca ĉevalisto. Kun iliaj kvadrataj krimulaj vizaĝoj oni dirus ke ili estas ŝtelforkurintaj el malli-berejo. Ĉiuj tiuj viraĉoj havas ne malpli ol dudek tranĉitaj infanmanoj sur sia konscienco, ne kalkulante la domojn, kiujn ili bruligis, la flegisti-nojn, kiujn ili malkuraĝe mortpafis. Tiaj bildoj estas donataj al la alsacaj infanoj, de kiuj la patro aŭ maljuna frato portis ĝenerale la kampgrizan („feldgrau”) uniformon. *Hejme, la infano vidas la fotografajon de la patro kiel germana soldato; en la libro ĝi vidas virojn portantajn la saman vestaĵon, reprezentatajn kiel malestimindaj friponoj.* La konkludoj, kiujn ĝi pri tio povas fari estas klaraj.

Estas tempo, ke oni ĉesu tiun histerian literaturaĉon. Ni ne volas, ke niaj infanoj estu politike venenataj. La lernejo estas destinita por doni al ili utilan kulturon, ne por enpenetriĝi en ilin la venenon de la franca ŝovinismo.

(El „Volkswille”-Strasburgo)

# Esperanto door Zelfonderricht.

## 6<sup>e</sup> LES

### Vertalingen der vijfde les.

TRADUKO. — Ĉi tiu rivero estas profunda, sed tiu lago estas pli profunda. Kiu estas pli forta, Karlo aŭ Frederiko? Karlo estas pli forta, li estas la plej forta el ni ĉiuj. Kia metalo estas la plej utila? Fero estas la plej utila metalo. Johano estas tiel granda kiel Vilhelmo. Ĉi tiu kuracisto estas tre klera. Eŭropo estas pli malgranda ol Azio. Dum la printempo la tagoj estas pli mallongaj ol dum la somero, sed dum la vintro ili estas plej mallongaj. La hispanaj vinoj estas la plej bonaj. Mia frato estas pli granda ol mi, sed mi estas la mallongaj pli maljuna. La domo estas larĝa kaj la strato estas mallarĝa. Ĉu la pordo estas tiel alta kiel la fenestro? Ne, la fenestro estas pli malalta. Arĝento estas pli multekosta ol kupro. Ŝi laŭte ekploris. Rekomencu! Relegu! Eble mi baldaŭ vin revidos. Li estas mensogema kaj ne lernema.

VERTALING. — Dezen herfst zullen wij zulke schoone vruchten hebben als verleden jaar. De beste vrouw is de slechtste man niet waard, zegt het volk. Die jongelingen zijn zeer werkzaam, maar de kleine Johannes is de werkzaamste. Mijn neef is zóó jong als ik. De toren van de Antwerpsche hoofdkerk is de hoogste van Vlaanderen. Wij kwamen te voet van Lier en waren zeer vermoeid. Zoodra ik te bed was, sliep ik in. Rubens is een zeer beroemd Vlaamsch schilder. Die vertaling is moeilijker dan zij schijnt. Uw huis is hooger dan het mijne. Is het mijne werkelijk het laagste? Ik heb meer geld dan ik dacht! Plotseling schrok ik. Ik zag mijn heele leven terug en begon aan alles te denken, wat ik beleefde.

VOORZETSELS. — De voorzetsels hebben in 't Esperanto een begrensd, bepaalde beteekenis. Ziehier de voornaamste: **al**, naar; **an-stataŭ**, in plaats van; **antaŭ**, vóór; **apud**, bij (in de nabijheid); **ĉe**, bij (het fransche chez); **ĉirkaŭ**, rond; **da**, na een woord dat een maat uitdrukt; **litro da biero**, een liter bier; **de**, van; **dum**, gedurende; **ekster**, buiten; **el**, uit; **en**, in; **ĝis**, tot; **inter**, tusschen, onder; **je**, heeft geene bepaalde beteekenis: **je via sano**, op uwe gezondheid; **kontraŭ**, tegen, tegenover; **krom**, benevens; **kun**, met; **laŭ**, volgens; **malgraŭ**, niettegenstaande; **per**, door, door middel van; **po**, zooveel ieder, het stuk: **de boter kost 40 frank het kilogram**, la butero kostas po 40 frankoj por kilogramo; **por**, vóór; **post**, na, achter; **pri**, nopens, over; **pro**, voor, ter wille van; **preter**, voorbij; **sen**, zonder; **sub**, onder; **super**, boven; **sur**, op; **tra**, door; **trans**, over.

— Het achtervoegsel **ad** drukt de voortduring van eene handeling uit: het lezen, la legado, redevoering, parolado.

— Het achtervoegsel **er** vormt het deel van hetgeen het grondwoord uitdrukt : sneeuwvlok, neĝero ; hagelsteen, hajlero.

VERTAAL. — Waarom lacht gij om dezen man? Ik gaf hem tien frank. Tegenover de kerk stonden drie boomen. Hij werkt van den morgen tot den avond. Zult gij naar Antwerpen gaan? Hij stierf voor zijn vaderland. Hij verdeelde alles tusschen zijne kinderen. Elk nummer kost één frank. Hoeveel personen zullen aan het banket deelnemen? Tot spoedig! Zonder familie. Onder één dak. Hij vloog over de Schelde. Door de wereld. Volgens mij, zou 't beter zóó zijn. Één voor allen, allen voor één. De aarde draait van het westen naar het oosten. Men stal van die vrouw al hare juweelen, De aanbidding der herders. Het was een lange maar mooie wandeling. Hebt gij „Grashalmen” van Walt Whitman reeds gelezen?

TRADUKU. — En la malhelo ĉiuj katoj estas grizaj. Dankon pro la afabla letero, kiun vi skribis al mi. La suno brilis sur la ĉielo. Ĉu mi povas peti de vi glason da akvo. Mi protektos vin kontraŭ li; do ne timu. La vilaĝo kuŝis ĉe la rivero. La ĉefpreĝejo estas tute apud la urbo-domo. La 1a. Flandra Kongreso de Esperanto okazos en Antverpeno dum Pentekosto. Venu multnombre! Li ploris de ĉagreno pro la morto de sia patrino. Mi venos postmorgaŭ. La policisto postkuris la ŝteliston. Centimo, cendo, franko, duobla franko estas moneroj. Estas monbiletoj de kvin, dek, dudek, kvindek, cent, kvincent kaj mil frankoj. La strikado de la havenlaboristoj daŭris pli ol kvin semajnojn. Ĉu vi ion scias pri reflektaj movoj; — ĉu pri la bretona nacionalista movado?

## BIBLIOGRAFIO.

(Ni recenzas duope senditajn verkojn, unuopajn ni citas.  
Ĉiu verko estas havebla ĉe „Flandra Esperanto-Instituto”).

*La du Amatinoj.* — *La Kapricoj de Mariano* de Alfred de Musset, tradukis Jan van Schoor. Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. 112 paĝoj 14 X 18 cm. Prezo : 10 b. fr. (2 belgoj).

La libro, kiun prezentas la tradukinto ne konigas al la Esperantisto — nesciante ĝui la originalon — la brilan poeton de la Amo, sed la noveliston kaj teatraĵiston. En ambaŭ retroviĝas la subtila talento de Alfred de Musset, senĝena, kaprica fantazio, profunda psikologia analizo kaj malatento pri homaj konvencioj.

„Mi ŝajnis fierogon”, ie diras la aŭtoro, „pri tio, kio mi ne estis laŭfunde. Mi gloris min esti pli malbona ol mi estis, kaj sentis en tia emocio strangan plezuron, miksitan de malĝojo. „Estis” la malsano de la jarcento” kaj neniu pli suferis de ĝi ol de Musset mem.

En „La Kapricoj de Mariano”, kiu daŭre restis sur la repertuaro de la „Franca Teatro”, de Musset analizas tiun duoblan animstaton, kiel en „La Du Amatinoj” duoblan amon al riĉa kaj al malriĉa virino.

Pri la traduko de Jan van Schoor, zorge eldonita, sufiĉas diri ke ĝi estas rekomendita de la „Esperantista Literatura Asocio”. Ĝi preskaŭ estas ekvivalenta al la originalo laŭ la ĉarma, ŝanĝkolora teksaĵo de la stilo, la eleganteco kaj sprita ironio, modele konservitaj en flua Esperanta lingvaĵo.

HECTOR VERMUYTEN.

### RICEVITAJ REVUOJ.

Breiz Atao, 76, 77, 78, 79; Oomoto Internacia, 36a; Espero Katolika, 69, 70; International Language, 6; The British Esperantist, 296; Hinda Esperantisto, 5; Sennaciulo, 269; Dordrechta Esperantisto, 11; Groninger Courant, 791 (kun recenzo pri nia revuo).

## 1a Flandra Kongreso de Esperanto.

*Antverpeno, 7an-8an-9an de Junio 1930.*



La Organiza Komitato estas kunmetita el du deligitoj de ĉiu el la organizantaj grupoj; la neŭtralaj grupoj „La Rekta Vojo” kaj „Hobokena Grupo”; la socialista grupo „Nia Ideo” kaj „Flandrema Grupo”. La prezidanto estas Juul Karnas de „La Rekta Vojo”; la sekretario-kasistino Martha Vervloet de „Flandrema Grupo”; Mortiers de „Nia Ideo” estas vic-prezidanto. *Adreso de la Kongresa Oficejo*: Gravinstraat, 32, Borgerhout-Antwerpen.

Propagandaj Glumarkoj, Kongresaj Poŝtkartoj kaj Afişoj estas presataj.

Oni mendu la kongresajn eldonaĵojn kaj petu ĉiujn informojn ĉe la supre citita adreso.

Aligu kiel eble plej baldaŭ por plifaciligi la laboron de la organiza komitato.

Pli detalaj informoj kaj la programo de la kongreso aperos en nia sekvonta numero.

# INTER NI.

*El Sta. Nikolao. — Al Triumfo.* — La kurso kontentige progresas. Jam de nun oni trovas inter la novaj geanoj bonajn elementojn.

Dum la lasta kunsido la sekretario legis leteron pri venonta Flandra Esperantista Kongreso kaj atentigis pri la fakto, ke „Al Triumfo” laŭstatute aliĝis la Belgan Ligo; tamen, la statutoj tute ne malpermesas simpation por la starigo de Flandra Ligo kaj Sta. Nikolao estos multnombre reprezentata dum la Antverpena kongreso.

Kelkaj membroj pilgrimadis al la ĉiujara vintra kermeso kaj bonege sin amuzis. Mirinde estis, ke la ĉarmulinoj (!) el „Le Lapin Rouge” bonege komprenis Esperanton kaj tute forgesis, ke ili estas Orientaninoj.

*El Ronse.* — En Ronse fondiĝis grupo en Julio; kvankam tutjuna ankoraŭ, ĝi daŭre kreskas. Nova kurso okazas depost Oktobro: 20 genovoluj sin enskribigis kaj ĉiusemajne la lecionoj okazas en la faklernejo de St. Ambrosius.

La grupo havas 12 membrojn sed pligrandigos tiun nombron je 25-30. Ĉiumerkrede je la 7 1/2 a. precize perfektiga kurso fruktedone okazas, dum kiu oni diskutas, lernas kantojn, k. t. p. La du kursoj estas gvidataj de S-ro De Boes, la senlaca propagandisto por nia afero.

La regularo de la grupo estas redaktata kaj disdonata al ĉiu membro.

Tiamaniere fervore agas „La Paca Stelo” en Ronse, kie ankoraŭ antaŭ duona jaro troviĝis neniu Zamenhofano, kaj ĉiam marŝas antaŭen por plia propagando.

*El Liero.* — Ni treege bedaŭras, ke la estraro de la „Liera Stelo” poinias, ke ĝi ne oficiale povas kunlabori al la organizo de Flandra Kongreso de Esperanto en 1930.

Tamen la spirito de tiu kongreso estos vere neŭtrala; tion atestas la kunmetado de la organiza komitato.

Ne okazos kiel dum la belgaj kongresoj, ke oni traktos la flandrojn kiel fremdulojn... en propra lando!

Ni tutkore esperas, ke la estraro de la „Liera Stelo”, kiu firme asertas ke ĝi estas flandr...em...a, ŝanĝos sian agmanieron, iĝos konsekvenca kaj kunlaboros al vere neŭtra'a, vere Zamenhofa kongreso.

Se ne, ni certe faros nian eblon, por ke la Lieraj esperantistoj ne aliĝu al kongreso, kie nia gepatra lingvo estas konsiderata kiel aĉaĵo!

LIERA STELANO.

*El Antverpeno. — La Rekta Vojo.* — Decembro estis speciale fest-monato. La 14an. okazis kinematografvespero, la 21an. plene suk-



cesinta balo en „Café des Billards” kaj la 28an. Kristnask- kaj jarfesto en nia sidejo „De Gulden Kroon”, Sint-Jakobsmarkt, 98, apud la Flandra Teatro.

*Flandrema Grupo Esperantista.* — Nia grupo ĉiam kreskas, daŭre serioze laboras. Ĉar kelkaj interesuloj petis organizon de nova kurso, ĉi tiu komencos en Januaro kaj estos gvidata de Victor Collet, kunredaktanto de „Flandra Esperantisto”.

La 29an. okazis Kristnaskfestoj en nia sidejo; pri tiu festo vere en „rondo familia” ni diros pli en la sekvonta numero.

Antaŭ nelonge ni havis tre interesan kinematografan vesperon kun parolado de S-ro Crols pri koloraj filmoj; estis montrata al ni tia filmo. Sekvis du instruaj filmoj kaj kiel distraĵo filmo kun la artista, senegala Charley Chaplin. Dankon ni ŝuldas al S-ro Crols, la agento en Antverpeno de la Kodak-aparatoj; niaj membroj memoru tion kaj aĉetu ĉe li ĉiujn fotonecesaĵojn; lia magazeno troviĝas Meir, 15. MART.

*El Aalst.* — *Postfesta Eĥo.* — En nia antaŭlasta numero ni raportis pri la festo, kiun la grupo „Pioniro” organizis dum Oktobro. La festo jam donas siajn fruktojn je propaganda vidpunkto. La organizintoj de la festo tuj anoncis Esperanto-kurson post la bonsukcesinta festo kaj 72 gelnantoj enskribigis sin. La kurso estas gvidata de S-ro De Bondt, la vic-prezidanto de la grupo. La sama grupo ankaŭ daŭrigas perfektigan kurson por 25 geanoj. Kelkaj Pioniranoj sin preparas por ekzameno pri profesora kapableco.

## Pri „Flandra Esperantisto”.

Preskaŭ ĉiuj esperantaj gazetoj menciis la aperon de nia revuo, kelkaj recenzis ĝin, kaj jen kion i. a. skribis *Utrechta Esperantisto* :

„Esperanto lingvo de l'malgrandaj popoloj; jen unu el la celoj, aspirataj de l'esperantistoj! La malgrandaj popoloj, kiuj dum jarcentoj estis devigataj uzadi la lingvojn de subpremantoj kaj venkintoj, nepovante libere uzi la propran lingvon, per Esperanto turnu sin al la mondo por paroli al ĝi pri siaj interesoj kaj celadoj, siaj ĝojoj kaj suferoj. Estis evidente, ke niaj Flandraj samlingvanoj ne daŭre restos esprimantaj sin pere de organo, komuna por ili kaj la valonoj. La interesoj de l'flandra popolo multe diferencas de tiuj de l'valona parto de l'Belga loĝantaro, ilin eĉ kontraŭas. La vera flandro amas sian malgrandan Flandran landon, sian lingvon, siajn historion kaj alceladojn. Li sentas bezonon libere sin esprimi. Ankaŭ la flandra esperantisto tion bezonas, volante paroli

al esperantistaj fratoj de l'tuta mondo. Por tion fari la flandran esperantistaro bezonas sian propran organon. Jen do ĝi estas : Flandra Esperantisto. Sed ne por disdiri malvastanimajn, ŝovinismajn ideojn ĝi eliris. Ĝi aperis en la mondon por konigi al eksterlandanoj la flandran kulturon, por ĉie varbi amikojn, por labori por Flandrujo, por Esperanto kaj por la Mondpaco. Kaj kiel tian ni salutas la novan fraton inter niaj vicoj, dezirante al ĝi longan vivon kaj fruktodonan laboron."

La sama revuo en la sekvonta numero skribis pri la enhavo de nia revuo :

„En la lasta numero ni jam aplaŭde salutis la aperon de *Flandra Esperantisto*, promesante ion diri pri ĝia enhavo, kion ni nun faros, kiom la spaco tion permesas.

Ĝia unua numero sin prezentas kun riĉa programo, kiu resumiĝas jene : F. E. volas esti la parolilo de ĉiuj esperantistoj, kiuj simpatias kun la ideoj, entenataj en la devizo „Libera Flandrujo en paca mondo“ : memstareco por la flandroj, por ĉiuj gentoj ; — paco inter ĉiuj popoloj !

Belan komencon ĝi faris, per Zamenhofaj Paroloj rememorigante al la nuntempa esperantistaro, ke krom lingvo, Esperanto prezentas al ni ankoraŭ ion alian : la Internan Ideon. Bedaŭrinde lastatempe tiu bela ideo tro ofte forgesiĝas. Ni ĝoju, ke nove aperanta Esp.-gazeto ne hontas konfesi tiun ideon, eĉ bazas sur ĝi sian programon. Tiom pli simpatia la gazeto estas al ni.

Vigla artikolo de Hugo Verriest laŭtigas la gloron de l' historia flandra popolo kaj instigas ĝiajn posteulojn vekigi el letargio, esti si mem, vivi, labori, paroli flandre.

La nomo de l' redaktoro Jan van Schaor garantias, ke ne nur prozaa estos la enhavo, sed ke sentoplenaj, la kordojn de l' animo tuŝantaj poemoj varios ĝin, Jam ni trovis poemon „Katalunoj!“, kora alvoko al samsorta subpremita popolo ; kaj „Eden-Hejmo“ de René de Clercq, tradukitan de van Schoor, kaj krome poemojn de aliaj aŭtoroj.

Fine ni menciuj, ke la revuo enhavas Esp.-lecionojn por meminstruado."

Multfoje ni revuo estis jam laŭdata ankaŭ en la flandra gazetaro *Het Kortrijksche Volk*, la katolika semajna gazeto de la distrikto Kortrijk, diris pri nia revuo : „Het is een flnk opgevat tijdschrift dat spoedig eene vooraanstaande plaats zal weten te veroveren in de lange rij der Esperanto-tijdschriften". (Estas bonege redaktita revuo, kiu baldaŭ scios akiri antaŭan lokon en la longa vico de Esperanto-revuoj."

## Flandra Esperanto Instituto

Gravinstraat, 32  
BORGERHOUT-ANTWERPEN  
Poŝtĉekkonto 2427.03

Presado - Eldonado - Librovendado

Propagando - Instruado.

Petu niajn prezojn !

ESPERANTISTEN !  
BLINDENVRIENDEN !  
ABONNEERT U  
op het maandblad van het  
**Algemeen Blindenverbond**  
van Vlaanderen

29, Rijselsche baan, Antwerpen-West  
Jaarlijksche bijdrage : 10, 30 of 100 frank.  
Postcheck 105.224.

Helpt daadwerkelijk de  
Vlaamsche blinden.

Ĉiu literaturema esperantisto devas  
posedi la belegan poemaron

### AMO KAJ POEZIO

de Jan van Schoor  
kaj LA DU AMATINOJ

kun

LA KAPRICOJ DE MARIANO  
de Alfred de Musset.

Tradukitaj de Jan van Schoor  
kaj rekomendita de *Esperantista*  
*Literatura Asocio.*

La prezo estas nur po 2 belgoj (send-  
kostoj enkalkulitaj).

Ambaŭ verkojn mendu ĉe „Flandra  
*Esperantisto*” aŭ ĉe „Flandra Espe-  
ranto-Instituto”.

## PAUL KUTSUKIAN.

Ĝenerala agento por la provincoj  
Antverpeno, Okcident-kaj Orient-  
Flandrujo de la aŭtomobiloj kaj  
ŝarĝveturiloj

### REO

Ĝenerala agento por la provinco  
Antverpeno de la ŝarĝveturiloj

### INTERNATIONAL

TELEFONOJ : 916.48 - 985.15

Laborejo kaj Ekspozicia salono :  
BELGIËLEI 149, ANTWERPEN.

## Algemeen Vlaamsch Huis

### „MALPERTUUS”

S. POT - HANSEN

Frankrijklei, 8 - Antwerpen.

Bekend voor zijn extra dranken

o. m. Dortmunder, Spalterbräu,

Leeuwenbier.

Goed koud buffet      Goede bediening.

## HUIS DE LEY

Driekoningestraat. 43, Berchem.

### De Ley & Verschueren

CITÉ

N<sup>rs</sup> 143-144-145-146-147-179-180-  
208-209

Groote keus in Vrouw- Manstoffen

Zijde, Fluweel en Voeding.